La 115-a Legokunsido

En la 1a de junio ni havis la 115-an legokunsidon por **"Australia Felix"** de Trevor Steele. Partoprenis kvar personoj.

Australia Felix —fascina verko—

Aida Yayoi

En la komenco mi ne povis ĝui la verkon, kvankam mi tralegis ĉiujn 11 volumojn en la libro. La kialon mi nebule rimarkis: mia kapablo malaltas por ellegi ilin en unu monato. Tempo fluis rapide kaj nun mi devas recenzi iamaniere. Pro okupiteco mi ne relegis ĉiujn sed elektis nur kelkajn, postlasinte la plej longan kaj verŝajne unuarangan verkon, "Por savi nigran animon", kaj same altkvalitan, "Koroboria Vespermanĝo". Strange en mia relego mi trovis neatenditan intereson. Pli da atentemo pri vortoj, esprimoj kaj pri la vidpunkto de la aŭtoro kredeble gvidis min al pli profunda engaĝiĝo en la verko.

"Samuel Birrubali Rossiter" La ĉefrolulo estas aborigena deveno. Pro blankula edukado devigita de politika kaj religia intencoj, li poste spertis sukceson diverskampe en la komunumo, sed ne mortinta rasismo hezitigis lin ĝui liberan vivon plene. Li ne edziĝis pro malfacila elekto de edzino, ĉu blankulino, ĉu nigrulino. Lia vivo estis disŝirita inter du mondoj; blankulaj kontraŭ aborigenaj. Nenie troviĝis azilo por li. La temo estas severa, sed skribaĵo ne estas peza, glate reliefigas unikan socion de praloĝantoj. Kelkaj epizodoj estas impresaj kaj kelkaj donas ŝokon. La epizodo pri la morto de lia aminda frateto estas malĝoja; tie esprimiĝas miksite realo kaj iluzio. Mi legis la scenojn kun granda kompato.

"Orienten el Perto" estas la plej mallonga rakonto en la tuta libro. Klasifike ĝi eniros en eseon. Tuj post mia renkonto kun ĉi tiu eseo, mi sentis ne malgrandan favoron, ĉar ĝi disvolvis antaŭ mi misteran substancon nomatan Aŭstralio, ne facile kompreneblan pro ĝia vasteco. Dank' al la ŝoforo de kamionego la aŭtoro vojaĝis per lia ŝarĝaŭto, kaj dume interparolis simple kaj mallonge per sekaj vortoj. Tiu konversacio ŝajnis al mi ia speca poemo. La aŭtoro antaŭlonge volis tuŝi aŭstralian teron kaj provis per tirĉareto. Sardone rigardis tion iu birdo.

"Amo al muŝoj" estas humura skribaĵo pri muŝoj en Kvinslando. Humuraj sed tute minacaj atakoj de muŝoj komencas kontraŭ preskaŭ ĉiuj korpopartoj de la aŭtoro. Li priskribas la scenojn detale kvazaŭ metiisto fidela al precizeco. Precipe pensmaniero per silogismo estas interesa. Rezulte la aŭtoro diras, "Mi do devas montri amon al muŝoj samkiel al aliaj homoj". Lia konciza, trafa esprimo bone funkcias.

Demandoj en Aŭstralio — "Australia Felix" de Trevor Steele

Mizro Iwaya

La aŭtoro estas fame konata aktivulo de Esperanto en Aŭstralio. Li aktivis ĉie en la mondo kaj verkis multon en Esperanto. Nu tiu ĉi libro estas frua kolekto de liaj noveloj kiu eldoniĝis post lia transiro al Litovio, nome en la jaro 1999. Ĝia ĉefa temo estas nunaj demandoj en lia hejmlando Aŭstralio.

Ĉi tie kolektitaj estas 12 noveloj kaj eseoj, longaj kaj mallongaj. Ĉiu temas pri Aŭstralio, kaj precipe duono el ili temas pri aborigenoj kaj ilia socio. La aŭtoro mem estas eŭropdevena blankulo, kaj mi kutime vidas ke blankuloj ĝenerale vivas tute aparte de indiĝenaj nigruloj. Sed la aŭtoro ne lokas sin aparte de nigruloj. Male li enpaŝas ilian socion kaj klopodas serĉi rimedon vivi kune. Bedaŭrinde tia provo ofte finiĝas en malsukceso laŭ la libro.

Tipa ekzemplo estas montrita en la kvina verko "Por savi nigran animon". Ni vidas ke la valo inter praloĝantoj kaj novvenintoj estas tro vasta ke ili ne povas konstrui interligan ponton. Maĵora blanka flanko provis tion kaj ĉi tion, sed minora nigra flanko ne bone akceptas ilin. Rezulte la blanka flanko perdas fervoron



kaj la nigra flanko vagas plu. Certe tia estas la problemo en nuna Aŭstralio. Eble ekzistas nenio krom tempo, kiu povas solvi ĝin.

La deka verko "Orienten el Perto" montras alian faceton de la aŭtoro. Li mem provis senti la "aŭtentan teron" de Aŭstralio. Li sola marŝis piede de Brisbano al Darvino, pli ol 2000km. Kelkaj el ni povus ekplani tian aventuron, sed kredeble neniu praktikas tion. Dume la aŭtoro fakte praktikis tion! Ni scias ke la aŭtoro fariĝis mondomigranto post tio. Li estas vere aktiva kaj praktikema persono.

Laste mi volas aldoni ke la stilo de la aŭtoro estas sufiĉe imitinda. Tiu fakto donas alian motivon al ni por legi lian libron.

Ĉu popol-noveloj aŭstraliaj? "Australia Felix" de Trevor Steele

Sibayama Zyun'iti

Tiu ĉi novelaro al mi ŝajnas esti tipa aŭstralia popol-novelaro — kvankam mi ne konas efektivan anglalingvan verkaron de aŭstraliaj aŭtoroj. La libro estas dividebla en 3 partoj: la unuaj 4 noveloj estas kresk-noveloj de junulo en moderna medio. La meza parto, unu novelo "Por savi nigran animon" 50-paĝa, enkondukas nin al la problemaro de aborigenoj en Aŭstralio, kaj la fina parto el 6 noveletoj donas variantojn de la aborigenaj aferoj.

La aborigenaj/blankulaj noveloj havas bazon, laŭ komentoj, en la vera sperto de la aŭtoro. Tie la protagonistoj, aŭ inteligentaj pensuloj/blankuloj en la rakontaro, havas ambivalencan senton al la aborigenoj/nigruloj. Mi uzas vorton "ambivalenco", ne kiel kuneston de amo-malamo, sed kiel kuneston de akceptosento-malakceptosento. Ekzemple en "Por savi nigran animon", blankula instruisto "akceptas" aborigenon nur kiel konvertiton al la blankula mondo, malakceptante sovaĝecon troveblan inter aborigenoj. La fino estas bona por akceptitoj, sed nebona por neakceptitoj. La seriozan tonon de tiu rakonto malpezigas humuraj scenoj en "La koroboria* vespermanĝo", en kiu aperas blankuloj adaptantaj sin bone, aŭ malbone, al la atmosfero de la mult-aborigena tero.

Nu, la rakonto estas el blankula okulo, sed speciale de la ĉefa, socie forta, blankulo. Tion mi sentis, ĉar iom antaŭe mi legis nefikciaĵon de Tibor Sekelj en "Mondo de Travivaĵoj". Tie en la rakonto "Sklavoj de Opalo", la jugoslava aŭtoro vivas kelkajn tagojn ĉe el-jugoslavaj aŭstralianoj, ŝajne la malĉefaj, socie malfortaj (kvankam fizike fortikaj) laboristoj. Cetere, Sekelj uzas vorton "indiĝeno", sed Steele "aborigeno". Kia diferenco?

*koroborio: danca evento de aborigenoj aŭstraliaj

Letero pri Eroŝenko

Lastatempe venis letero al ni, kredeble ĉar ni ofte skribis pri Eroŝenko, rusa esperantista poeto, kiu verkis japane en Japanio. Ĉar estas en ni membroj traktantaj la aferon, ni plenumis lian peton.

Saluton! Mia nomo estas Adam Kuplowsky. Mi venas de Toronto, en Kanado.

Mi ŝatas legi fabelojn de Vasilij Eroŝenko. Mi legis tradukojn de Malvasta kaĝo kaj Stranga kato. Nun mi serĉas tradukojn de Morto de Kanario, Matu no ko (=Pininjo), kaj Ŝipo de feliĉo. Ĉu vi povas diri al mi, kie mi povas trovi ilin? Dankon,

Adam Kuplowsky